



La kadavro, kiu ne konis sin

Je la komenco estis la ĉielo kaj la tero. La treege bela etulino naskiĝis en la fajrlando. *Hella* ŝatis ludi sur la plenfloraj kampoj kaj verdaj arboj de sia mondo. Tie ankaŭ loĝis aliaj afablaj bestoj. Laŭ ŝi, ĉiuj vivaj estaĵoj estas amuzaj. El ĉiuj, la etulino amis speciale ludi kune kun tri el ili: *Duko*, *Vipo* kaj *Sanso*. La unua besto nek aŭdis, nek vidis perfekte, pro sia maljuneco. La dua estis lerta kaj ĝi havis la plej bonan flaron de la planedo. La tria kaj lasta estis la plej malgranda el ili kaj ekde ŝia naskiĝotago ĝi akompanis ŝin.

1

Unu tagon *Hella* aŭdis strangan frazon el nekonata almozulo:

— Kiam vi vidos *brilimon*... en ĉi tiu tago, vi ne plu vidos viajn agrablajn amikojn — la olda viro profetis al ŝi. Bedaŭrinde kiam la eta knabino aŭdis tion, ŝi sentis malagrablan senton pri tia pensado. Ili estis kune kun la bela knabino ekde kiam ŝi debutis en la mondo, do ŝi ne konsideris tiun komenton. La knanjo ne forlasus siajn amikojn. Krome, ŝi demandis nenion al la maljunulo.

— La tempo pasis kaj ankaŭ kuras! Kaj ni kuras kun ĝi. Aŭ ĉu la tempo kuras tra ni, aŭ per, eble? Ĉi tio ne plu estas grava nun — ŝi pensis. Ĉio okazis nokte. Tiam, la tempo prezentis ŝiajn cikatroj: ĉiuj malĝojaj realecoj estis sentitaj en tiu nokto. Do, la junulino vivis la plej acidan realecon de sia vivo.

La turno-vento de senfinaj kaj strangaj eventoj, kiu trapasis ŝin, alvenis al la fino. La juna virino estis ankoraŭ paralizata, nekompreneble, antaŭ tiu ekstravaganca matematiko pri la kadavroj. — Vi konas min pli bone, ol mi mem konas min! — ŝi lace konfesis. Tiam finfine mateniĝis.

— Spirado estas ĉio — la maljuna viro diris al ŝi. Tio estas unu el liaj multaj klasikaj frazoj. Ŝi estis, ankoraŭ spireginte, sidanta sur la ŝtono. Li estis rigardanta apud ŝi. Dum kelka tempo, neniu babilado. Li prizorgante brakumis ŝin per siaj trankvilaj okuloj.

— Vi meritas premion — li flustris al ŝi kun rideto sur sia vizaĝo. Li komforte malleviĝis kaj ĝentile metis siajn manojn sur ŝiajn ŝuojn por senŝuigi ŝin. Ŝi, ankoraŭ hebecece pro la perdo de siaj tri bonaj amikoj, kaj sen kompreni la agon de li, nur rigardis lin strange.

— Kadavro malestimas ŝuojn. Memoru ĉi tiun konsilon — diris la saĝulo, samtempe forigante la lacajn ŝuojn de ŝiaj delikataj piedoj, kiuj nudaj ne sentis la freŝan teron ekde la tempo, kiam ŝi estis infano.

Tiam la senvestaj piedoj tuŝis la rosan greson. En ĉi tiu momento, ŝi vidis la estaĵon. Ĉarma *brilimo* milde eksidis sur unu el siaj manoj. Tiam ŝi sentis agrablan ekstremon tra sia tuta korpo. Ĉi tiu afabla ekstremo sur ŝia korpa haŭto estis kiel delikata kareso de la amata persono. Ŝi sentis interne la brilan lumon, kiu karesis ŝian animon. Do, finfine *Hella* sentis siajn piedojn, nun tute nudajn. Ŝiaj sentoj estis vekitaj: ŝi aŭdis la muzikecon de la vento, kiu emanis de la foliaro de la arbaro; ŝi povis senti la kolorojn de la aromoj de la trapasantaj floroj tra ŝiaj korpo kaj animo, kaj tiel plu. La humila *Gvandii* stariĝis kaj donis al *Hella*: bovlon, nadlon kaj *silek*son.

— Nun mi pensas ke vi scios kiel uzi ĉi tiun ilon — kaj rigardante al ŝi, ĝentile li palpebrumis al ŝi kaj diris: — Sublimi estas ankaŭ nepre necese — alia frazo, kiun li ŝatis diri al ĉiuj en la adiaŭa momento. Do la plejaĝulo foriris kun sia ĉarma, magnetata, taŭga kaj luma rideto sur sia vizaĝo.

Tiam, la bela virino kaptis la ĝustan amplekson de la vivo kaj kriis kvarventen pri la fina venko: — Kia sensacio MIIIIII-RIIIIIINN-DA-A-A! Uhĥuuuŭ, tiu momento estas simple.... — En la daŭro de mia tuta vivo mi neniam vidis tiel ĉarman, belan estaĵon!

La saĝulo, kiu estis ankoraŭ proksime, nur ridis kaj diris al si mem: — La mondo estas vere bela loko por vivi bunte! Alivorte, simple... — kaj li revenis al sia vojaĝo tra la mondo kun siaj tiel belaj kaj ekzotaj estaĵoj.

- 0 -

Vortareto

Brilim/o. ☉ Estaĵo, kiu celas liberigi la homojn disde la suferoj per konscio.

Sileks/o. ⊕ Fajroŝtono. Silikŝtono. *Silex* en latina lingvo.

Kvar/vent/e. Adv., signifanta «Ĉiudirekte».